


**Eldonis** | Statutární město Brno | Kancelář primátora - Kancelář strategie města | Husova 12 | 601 67 Brno | tel | +420 542 171 111
info@brno.cz | www.brno.cz | 2007 | **Teksto** | MMB
**Fotoj** | Štěpán Vrzala, Zdeněk Kolařík, Marie Schmerková, Miloslav Bouška, David Židlický
**Grafika aranĝo** | Věra Marešová, Grafex - Agency s. r. o.

Sudmoravia regiono

ĈI TIU PROJEKTO ESTAS KUNFINANCATA DE EŬROPA UNIO

Česká republika

B | R | N | O



# Urbo Brno | ĝusta direkto

www.brno.cz

# Enkonduke |

La urbo Brno (Brunno), la dua plej granda urbo de Ĉeĥa Respubliko kun preskaŭ 400 000 enloĝantoj, situas en la centra parto de Eŭropo. En la distanco de 120 ĝis 200 km de la urbo troviĝas aliaj signifaj eŭropaj metropoloj: Prago, Vieno kaj Bratislavo. La internacia aerodromo de Brunno estas regule ligita al internaciaj aerlinioj.
Brunno estas la metropolo de Moravio kaj signifa turisma centro por ĉiuj, kiuj volas ekkoni la naturajn kaj kulturajn belaĵojn de suda Moravio. Norde de la urbo situas la protektata teritorio Moravia Karsto, sude etendiĝas vinberejoj kun stilaj vinkeloj. La urbon ĉirkaŭas belaj miksaj arbaroj, kiuj liveras multajn ŝancojn por turismo kaj biciklado.
En Brunno troviĝas multaj signifaj monumentoj, kiuj atestas ĝian riĉan historion. Iama komercista setlejo, estiĝinta antaŭ ok jarcentoj ĉe la kunfluejo de la riveroj Svratka kaj Svitava, sukcese rezistis la sieĝadojn husanan kaj svedan, travivis la militan ekspedicion de Napoleono al Slavkov (Austerlitz) kaj 1a kruelajn sekvojn de la malvenko de Aŭstrio en la batalo de la tri imperiestroj. La urbo fariĝis industria centro de la habsburga monarkio, „aŭstria Manĉestro“, kaj en la 20-a jarcento akiris modernan aspekton danke al konstruaĵoj en funkciisma stilo. La plej signifa monumento de la moderna arkitekturo estas la vilao Tugendhat - Unesko-monumento.
La nuntempa Brunno estas sidejo de universitatoj kaj signifaj justic-organoj. Ĝi ebligas riĉan ĝuon de kulturo en teatroj, muzeoj, galerioj, kinejoj kaj kluboj. Elstaran ekonomian kaj socian signifon por la metropolo prezentas ĝia foira ekspoziciejo kun okdekjara tradicio, loko, kie okazas pluraj internaciaj foiroj, ekspozicioj kaj kongresoj. Ĉiujare en la urbo okazas kulturaj aranĝoj, festivaloj (ekz. Brunno - urbo meze de Eŭropo kun publika spektado de piroteknikaj lumludoj Ignis Brunensis) kaj ankaŭ signifaj sportaj aranĝoj (Grand Prix por ŝoseaj motorcikloj). En la urbo troviĝas ankaŭ modernaj superbazaroj kaj amuz-centroj.









# Monumentoj |

## 1 Burgo Špilberk

*Špilberk 1* | www.spilberk.cz



Reĝa burgo el la 13-a jarcento, rekonstruita en la 17-a kaj 18-a jarcentoj al baroka citadelo, iam la plej fama malliberejo en la tuta habsburga monarkio, nomata „prizono de nacioj“. Sidejo de Muzeo de la urbo Brunno kun konstantaj ekspozicioj pri la historio de la burgo kaj de la urbo. Por publiko alireblaj estas ankaŭ kazematoj, malhelaj ejoj en la fortreso, kiuj origine servis kiel kaŝejo por soldatoj, poste kiel prizono por la plej gravaj krimuloj. La burgon ĉirkaŭas vasta parko kun pluraj monumentoj kaj elvidejo al la urbo.

## 2 Katedralo de la Sanktaj Petro kaj Paŭlo

*Petrov 1* | www.biskupstvi.cz



Origine romanika baziliko sur la altaĵo Petrov (Petromonto), rekonstruita en la stilo gotika. Lime de la 19-a kaj 20-a jarcentoj estis faritaj novgotikaj adaptaĵoj. Krom la barokaj internoj estas publike alireblaj ambaŭ turoj kaj kripto. La katedralo kune kun la burgo Špilberk kreas karakterizan silueton de la urbo. El la altaĵo Petrov oni povas ire atingi la suprajn terasojn de la kapucenaj ĝardenoj kaj la Denis-parkon.

## 3 Vilao Tugendhat

*Černopolní 45* | www.tugendhat-villa.cz



Perlo de brunna moderno kaj ĉefverko de la monda funkciisma arkitekturo. La plej signifa eŭropa edifico de arkitekto Ludwig Mies van der Rohe, konstruita en 1929-1930. En la j. 2001 registrita en la listo de la monda heredaĵo de Unesko. Familia vilao de la geedzoj Tugendhat elstaras per sia originala spac-aranĝo, unika teknologia ekipaĵo kaj elegantaj internaĵoj kun detale prilaborita meblaro.

## 4 Kapucena kripto

*Kapucínské nám. 5* | www.volny.cz/kapucini.brno/



Baroka kripto troviĝas en la subterejo de la kirko de kapucena monaĥejo kaj estas publike alirebla. La kripto servis ekde la mezo de la 17-a jarcento kiel sepultejo de membroj de la kapucena ordeno, de ĝiaj mecenatoj kaj aliaj signifaj personoj inkluzive de la fama estro de panduroj, barono Trenck. Unika sistemo de la cirkulado de aero ebligas mumiigon de la libere kuŝigitaj korpoj de la mortintoj.

## 5 Malnov-brunna monaĥejo kaj templo de la ĉieliro de Sankta Maria

*Mendlovo nám. 1* | www.opatbrno.cz



Origine ĝi servis kiel monaĥinejo de Cistercianinoj, fondita en la j. 1313 fare de la reĝino Eliška Rejčka (Elizabeta Riĥenza). En 1783 ĝi fariĝis posedaĵo de Aŭgustenanoj. Unu el la abatoj de la ordeno estis ankaŭ Johann Gregor Mendel, la fondinto de genetiko. La specifa gotika templo de la ĉieliro de Sankta Maria en 1987 ricevis de la papo Johano Paŭlo la Dua la titolon „basilica minor“. La baziliko estas la plej suda brika gotika edifico en Eŭropo.

## 6 Templo de Sankta Jakobo | *Jakubské nám.*



Ĝi apartenas al plej valoraj monumentoj de malfrua gotiko en Ĉeĥio el la limo de la 14-a kaj 15-a jarcentoj. La turo de la templo, alta 92 m, havas tipan sveltan piramidforman pinton. Interne troviĝas la tombo de Louis Raduit de Souches, komandanto de la sukcesa defendantaro de la urbo kontraŭ la sveda sieĝado en la Tridekjara milito. En la subterejo estis malkovrita vasta ostejo.

## 7 Templo de Sankta Tomaso | *Moravské nám.*



Origine konsistaĵo de Aŭgustenana monaĥejo, fondita fare de moravia margrafo Johano Henriko, frato de la imperiestro Karolo la Kvara, meze de la 14-a jarcento. En la 17-a kaj 18-a jarcentoj la tuta komplekso estis rekonstruita en baroka stilo. En la templo troviĝas kopio de tabul-bildo de Nigra Sankta Maria, protektantino de la urbo; la originalo troviĝas sur la arĝenta altaro en la malnov-brunna baziliko.

## 8 Ruĝa kirko | *Komenského nám.*



La novgotika protestanta kirko de J. A. Komenský (Komenio) apartenas al la dominantoj de la brunna rond-avenuo. Ĝi estis konstruita en 1863-1865 laŭ la projekto de Heinrich Ferstel, aŭtoro de Vota kirko en Vieno, estante la unua granda nekatolika preĝejo en tiu ĉi regiono de Eŭropo. Ĝia nomo devenas de la koloro de la krudbrika masonaĵo.

## 9 Malnova urbodomo | *Radnická ulice* i

www.ticbrno.cz, www.kultura-brno.cz



La plej malnova nereligia edifico en Brunno kun diversaj arkitekturaj stiloj. Ekde la komenco de la 14-a jarcento ĝis 1935 ĝi estis sidejo de la urba administrantaro. La ŝtona portalo de la urbodoma turo kun la fama kurba pinta tureto (fialo), konstruero kolorigita per legendoj, estas verko de Anton Pilgram. En la trapasejo sub la turo pendas la famaj brunnaj drako kaj rado. El la renesanca galerio de la turo proponas sin impresa elvido al la urbo.

## 10 Nova urbodomo | *Dominikánské nám. 1*



Iama dominikana monaĥejo ekde sia ekesto en la 13-a jarcento servis al bezonoj de nobelara reprezentado kaj al kunsidoj de la landaj deputitaro kaj tribunaloj. En la 18-a jarcento la tuta komplekso estis rekonstruita en baroka stilo. Nuntempe la Nova urbodomo estas sidejo de la urbestro kaj de la urba reprezentantaro. Vidindaj estas precipe la mezepoka klostro, historiaj portaloj kaj reprezentaj salonegoj.

## 11 Menina pordejo | *Měnínská 7,* www.spilberk.cz



La unusola ĝisnuna urba pordejo de la mezepoka murega sistemo. Unuafoje ĝi estis skribe menciita en 1293. Ĝia turo estis origine je unu etaĝo pli alta. En la objekto, konstruita en la dua duono de la 16-a jarcento, okazas ekspozicioj de la urba muzeo.

## 12 Placo de Libereco | *Náměstí svobody*



La centra urba placo iam estis nomata Malsupra placo kaj en la mezepoko ĝin ĉirkaŭis domoj de notindaj brunnaj urbanoj kaj moraviaj nobeloj. Ĝia dominanto estas baroka pesta kolono kun statuoj de sanktuloj el 1679. Vidindaj estas ankaŭ belega renesanca palaco - La Domo de la Sinjoroj de Lipá – kun arkada korto - kaj la novrenesanca Klein-palaco.

## 13 Legoma foirejo | *Zelný trh*



En ĉi tiu loko jam jarcentojn okazas ĉiutagaj foiroj, kie oni povas aĉeti legomojn, fruktojn, florojn k.s. Ornamas ĝin baroka fontano Parnaso el 1690-1695. Ĝi prezentas kavernon el naturaj ŝtonoj, kiun ornamas alegoriaj figuroj, simboloj de antikvaj imperioj - Babilonio, Persio kaj Helenio. La akvon en ĝin kondukis la plej malnova ligna akvodukto el la rivero Svratka.

## 14 Teatro Reduta | *Zelný trh 4*



La plej malnova teatra edifico en la centra Eŭropo. La angula domo ĉe Legoma foirejo estis konstruita komence de la 17-a jarcento, rekonstruita al taverno, kie kunvenadis migrantaj teatro-trupoj. La urbo uzadis la domon por societaj aranĝoj kaj teatro-prezentaĵoj. En 1767 tie unuafoje okazis teatro-prezentado en la ĉeĥa lingvo kaj koncertis la dekunujara W. A. Mozart. Nuntempe la objekton uzas Nacia teatro en Brunno.

## 15 Mahen-teatro | *Rooseveltova 17*



Novrenesanca edifico laŭ projekto de la fama aŭtora duopo de vienaj arkitektoj Ferdinad Fellner jr. kaj Hermann Hellner. La 14-an de novembro 1882 ĝi estiĝis la unua teatra edifico en Eŭropo, kie por lumigado estis uzataj elektraj ampoloj de Edison, nomataj „Edison-lampoj“.

## 16 Judaj monumentoj

**Sinagogo** | *Na Skořepce 13*

**Tombejo** | *Nezamyslova 71,* www.zob.cz



La urbo fieras pri sinagogo en funkciisma stilo, konstruita en 1934-1936. Signifa monumento estas ankaŭ la Juda tombejo, unu el la plej grandaj en Moravio, kun novromanika ceremonia halo el 1900.

# Kulturo |

## Teatroj

**Nacia teatro en Brunno |** Dvořákova 11, tel.: +420 542 158 111, www.ndbrno.cz
- Mahen-teatro (dramo), Rooseveltova 17
- Janáček-teatro (opero, baleto), Rooseveltova 1
- Teatro Reduta, Zelný trh 4

**Urba teatro Brno |** Lidická 16, tel.: +420 533 316 301, www.mdb.cz, drama kaj muzika scenejo
**Teatro Husa na provázku |** Centro de eksperimenta teatro **|** Zelný trh 9, tel.: +420 542 123 425, www.provazek.cz
**Teatro de Bolek Polívka |** Jakubské nám. 5, tel.: +420 542 214 903, www.divadlobolkapolivky.cz
**Pupteatro Radost |** Bratislavská 32, tel.: +420 545 321 273, www.divadlo-radost.cz
**Teatro HaDivadlo |** Poštovská 8d, tel.: +420 542 212 761, www.hadivadlo.cz
**Teatro Divadlo v 7 a půl |** Sukova 4, tel.: +420 542 211 496, www.7apul.cz
**Studio Marta |** Bayerova 5, tel.: +420 542 591 512, www.jamu.cz
**Teatro Polárka |** Tučkova 34, tel. 541 212 912, www.divadlopolarka.cz

## Muzeoj

**Muzeo de la urbo Brunno |** Špilberk 1, tel.: +420 542 123 611, www.spilberk.cz
Burgo Špilberk, Měnínská brána, Vilao Tugendhat
**Moravia landa muzeo |** Zelný trh 6, tel.: +420 542 321 205, www.mzm.cz
Dietrichstein-palaco (Zelný trh 8), Episkopa korto (Muzejní 1), Palaco de Nobelinoj (Kobližná 1), Anthropos (Pisárecký park), Mendelianum (Údolní 39), Muzeo de Leoš Janáček (Smetanova 14)
**Teknika muzeo en Brunno |** Purkyňova 105, tel.: +420 541 421 411, www.technicalmuseum.cz
**Mendel-muzeo | Muzeo de genetiko |** Mendlovo nám. 1a, tel.: +420 543 424 043, www.mendel-museum.org
**Muzeo de romaa kulturo |** Bratislavská 67, tel.: +420 545 581 206, www.rommuz.cz

## Arto

**Moravia galerio en Brunno |** Husova 18, tel.: +420 532 169 111, www.moravska-galerie.cz
Pražák-palaco (Husova 18), Guberniestra palaco (Moravské náměstí 1a), Artmetia Muzeo (Husova 14)
**Dezajna centro de Ĉeĥa Respubliko |** Radnická 2, tel.: +420 542 211 423, www.designcentrum.cz
**Domo de artoj en Brunno |** Malinovského nám. 2, tel.: +420 542 211 808, www.dumb.cz, Domo de la Sinjoroj de Kunštát (Dominikánská 9)
**Junulara galerio, Galerio Kabineto, Galerio ĉe Bona Paŝtisto |** Radnická 4, tel.: +420 542 216 139, www.kultura-brno.cz
**Wannieck Gallery |** Ve Vaňkovce 2, tel. 543 256 072, www.wannieckgallery.cz

## Koncertejoj

**Filharmonio Brunno |** Komenského nám. 8, tel.: +420 542 214 255, www.filharmonie-brno.cz
**Muzika fakultato de JAMU |** Komenského nám. 6, tel.: +420 542 321 307, www.jamu.cz

## Muzikaj kluboj

**Blueberry Hill |** Dům pánů z Lipé, nám. Svobody 17, tel.: +420 532 292 114
**Club Ramirez |** Dominikánská 11, tel.: +420 774 540 000
**El Sombrero |** Zelný trh 20, tel.: +420 728 885 098
**Labyrinth music club |** Masarykova 25, tel.: +420 775 161 967
**Two Faces |** Biskupská 1, tel.: +420 775 960 930
**7. nebe |** Jánská 9, tel.: +420 777 994 494
**New Perpetuum music club |** Rooseveltova 9
**Livingstone |** Dominikánské nám. 5
**Klub 14ka |** Jánská 14, tel.: +420 542 221 839
**Caribic music club |** Běhounská 24
**Veselá Vačice music restaurant |** Běhounská 22
**Fléda |** Štefánikova 24, tel.: +420 775 376 004
**Semilasso |** Palackého 126, tel.: +420 541 212 426
**Mersey |** Minská 15, tel.: +420 541 240 623
**Šelepova |** Šelepova 1, tel.: +420 541 213 342
**Musilka |** Musilova 2a, tel.: +420 545 211 891
**Faval |** Křížkovského 22
**Leitnerova |** Leitnerova 2, tel.: +420 543 213 693
**Stará pekárna |** Štefánikova 8, tel.: +420 541 210 040

## Kinejoj

**Art |** Cihlářská 19, tel.: +420 541 213 542, www.kinoartbrno.cz
**Lucerna |** Minská 19, tel.: +420 549 247 070
**Scala |** Moravské nám. 3, tel.: +420 542 211 659
**Palace Cinemas |** tel.: +420 543 560 111, www.palacecinemas.cz
Olympia | U Dálnice 777, Modřice, Velký Špalíček | Mečová 2

## Kulturaj festivaloj

**Internacia muzika festivalo Brunno |** Paska festivalo de spirita muziko (marto/aprilo), Moravia aŭtuno (septembro/oktobro), www.mhf-brno.cz
**Brunno - urbo meze de Eŭropo |** festivalo de amuzo sub la burgoj Špilberk kaj Veveří, konkursa spektado de piroteknikaj lumludoj Ignis Brunensis ĉe la digo-lago de Brunno kaj Špilberk (majo/junio), www.bmue.cz
**Brunna kultura somero |** prezentadoj, koncertoj kaj aliaj kulturaj kaj societaj aranĝoj en la urbocentro (junio/septembro), www.kultura-brno.cz
**Brunnaj ŝekspiraj tagoj |** teatra festivalo en la burgo Špilberk (julio-aŭgusto), www.kultura-brno.cz
**Internacia muzika festivalo Špilberk |** simfonia festivalo (aŭgusto), www.filharmonie-brno.cz
**Brunnaj popol-festoj |** folklora festivalo en la urbocentro (aŭgusto/septembro), www.kultura-brno.cz

# Foira ekspoziciejo |

## Veletrhy Brno, a. s.

Výstaviště 1, tel.: +420 541 151 111 | www.bvv.cz
La brunna foirejo apartenas al la plej elegantaj eŭropaj ekspoziciaj kampoj. Ĝia areo ampleksas 650 000 $m^2$. La tuto estas konvene komponita en puran naturan medion de la valo Pisárky. La foireja komplekso estis fondita en 1928 kaj projektita de elstaraj enlandaj funkciismaj arkitektoj. Neforgeseblan atmosferon kreas precipe la unua el la 16 pavilonoj, la unika pavilono A, interesa estas ankaŭ la turo de la pavilono B, alta 45 m, teknike perfekta kupolo de la pavilono Z kaj la modernaj pavilonoj V kaj F. Al la foireja komplekso apartenas kongresa centro. En la foirejo ĉiujare okazas pluraj signifaj internaciaj foiroj, ekz. Internacia maŝinfaka foiro, Go kaj Regiontour, Styl kaj Kabo, Salima, Mobitex, Konstrua foiro, Invex kaj aliaj.





# Libera tempo kaj sporto |

## Brunna digo-lago

Populara refreŝiga zono kaj ideala loko por ĉiuj specoj de akvaj sportoj. Ĉe la bordoj troviĝas sportejoj, restoracioj, trinkejoj kaj manĝokioskoj. Regula ŝipa transporto inter la urbo kaj Veverská Bítýška funkcias ekde majo ĝis septembro (www.dpmb.cz). La lago estas atingebla per la urbaj publikaj transportiloj.



## Burgo Veveří | www.veveri.cz

La alia brunna burgo situas alte super la Brunna digo-lago en belega pejzaĝo de Podkomoraj arbaroj. Ĝi estas gotika, iam reĝa kaj ĉasa burgo, objekto de pluraj historiaj rakontoj kaj legendoj, kie en pasinteco vivis pluraj nobelaj posedantoj. Nuntempe en la burgo okazas kulturaj kaj societaj entreprenoj. Sub la burgo situas unu el la haltejoj de surlagaj motorŝipoj.



## Automotodrom | www.brno-circuit.com






Masaryk-ringo, aŭtomobila kaj motorcikla konkursejo, longa 5 403 m, situas inter la komunumo Ostrovačice kaj la urboparto Brno-Žebětín. Ĝi estis kreita en 1985-1987 kaj anstataŭigis tiel la originan klasikan urban konkurvegon, kie okazadis konkursoj ekde la tridekaj jaroj de la 20-a jarcento. La nova moderna ringo estas konata kiel unu el la plej sekuraj en la mondo kaj danke al sia situo en arboriĉa pejzaĝo ĝi estas ankaŭ unu el la plej belaj. La urbo Brunno havas sian fiksan lokon en la kalendaro de konkursoj pri monda ĉampioneco de motorcikloj kaj aŭtomobiloj. La plej signifa aranĝo estas la ĉiujara konkurso de ŝoseaj motorcikloj pri monda ĉampioneco Grand Prix de Ĉeĥa Respubliko (aŭgusto).

## Zoo Brno | tel.: +420 546 432 311 | www.zoobrno.cz



Zoologia parko etendiĝas sur 65-hektara areo kaj situas en la urboparto Brno-Bystrc proksime de la digo-lago. Bredataj estas tie bestoj el ĉiuj kontinentoj krom Antarktido. Al la plej allogaj apartenas tigroj kaj leopardoj, kanadaj lupoj, blankaj ursoj, kanguruoj, rabobestetoj surikatoj kaj la raraj Przewalski-ĉevaloj. Viziti oni povas novajn ekspoziciojn: Tigrajn rokojn, Tropikan reĝlandon aŭ Infanan zoon. Precipe en somero estas okazigataj pluraj aranĝoj por infanoj kaj ankaŭ plenkreskuloj.

## Stelobservejo kaj planetario | Kraví hora 2, tel.: +420 541 321 287 | www.hvezdarna.cz



## Botanika ĝardeno kaj arboĝardeno

Botanika ĝardeno | Kotlářská 2, tel.: +420 549 497 772
Arboĝardeno | Zemědělská 1, tel.: +420 545 223 606

## Banejoj kaj naĝostadionoj



Banejo sur Kraví hora | moderna komplekso kun internaj (25 m) kaj eksteraj basenoj (50 m) Banejo Riviéra en Pisárky | rivera banejo sur la rivero Svratka kun tri basenoj
Banejo Brno | Dobrovského 29 (naĝobaseno 50 m)
Endoma urbobanejo | Rašínova 12, tel.: +420 542 214 400
Ponávka 3a, tel.: +420 545 571 684
Kometa Brno | Sportovní 4, tel.: +420 541 212 236
(sporta kaj korp-ekzerca centro)
TJ Tesla Brno | Halasovo nám. 7, tel.: +420 545 222 672

## Sportaj kaj korp-ekzercaj centroj



Big One Fitness | sporta kaj rilaksa centro
Dornych 27, tel.: +420 543 254 616
Fitness Blue Gym | Kotlářská 51, tel.: +420 541 213 450
Aerobik centrum Brno | Merhautova 224, tel.: +420 548 529 330
Squash Radost | Cejl 52, tel.: +420 545 240 745

## Golfo

Golf Resort Brno Jinačovice | Brno-Jinačovice, 27-trua golfejo + 6-trua akademio (lerngolfejo), tel: 541 511 711, www.golfbrno.cz
Golf Club Austerlitz | Slavkov u Brna, 18-trua golfejo + 6-trua akademio (lerngolfejo), tel.: +420 544 221 963, www.austerlitz-golf-resort.cz

## Ekskursoj al ĉirkaŭaĵo | www.jizni-morava.cz



Protektata pejzaĝa teritorio Moravia Karsto | gutoŝtonaj grotoj, abismo Macocha
Batalejo Slavkov | loko de la batalo apud Slavkov, Monumento de Paco, Kastelo Slavkov
Kasteloj Rájec-Jestřebí | Boskovice | Lysice
Předklášteří u Tišnova | klostro Porta Coeli
Burgo Pernštejn
Vinkeloj sude de Brunno
Pálava kaj Mikulov | Lednice kaj Valtice | Znojmo | Vranov nad Dyjí

# Restoracioj kaj aĉetejoj |

## Restoracioj

**Pegas** | hotelo, restoracio, bierfarejo | Jakubská 4, tel.: +420 542 210 104
**Restaurace Plzeňka** | hotelo International, enlandaj manĝaĵoj | Husova 16, tel.: +420 542 122 572
**Středověká krčma** | Mezepoka taverno | enlandaj manĝaĵoj | Česká 6, tel.: +420 542 210 021
**U Švejka** | enlandaj manĝaĵoj | Česká 29, tel.: +420 542 210 248
**Stopkova plzeňská pivnice** | enlandaj manĝaĵoj | Česká 5, tel.: +420 542 211 094
**Hradní vinárna Špilberk** | vinejo en la burgo | Špilberk 1, tel.: +420 542 210 288
**Pod radničním kolem** | restoracio kaj vinejo | Mečová 5, tel.: +420 542 211 135
**Potrefená husa Brno** | internaciaj manĝaĵoj | Moravské nám. 8, tel.: +420 542 213 177
**Dávné časy** | stekoj | Starobrněnská 20, tel.: +420 542 215 292
**Besední dům** | internaciaj manĝaĵoj | Husova 20, tel.: +420 542 218 380
**U Kastelána** | internaciaj manĝaĵoj, Grand restaurant 2005 | Kotlářská 51a, tel.: +420 541 213 497
**Brabander** | internaciaj manĝaĵoj | Joštova 4, Pekařská 4, tel.: +420 542 211 922
**Pivovarská restaurace** | enlandaj manĝaĵoj, bierfarejo | Mendlovo nám. 20, tel.: +420 543 420 130
**Moravská chalupa** | hotelo Voroněž, enlandaj manĝaĵoj | Křížkovského 47, tel.: +420 543 143 100
**Taj** (Taĝ) | hindaj manĝaĵoj | Běhounská 12, tel.: +420 542 214 372
**U císaře Leopolda** | italaj manĝaĵoj | Orlí 3, tel.: +420 542 516 606
**Mandarín** | ĉinaj manĝaĵoj | Průchodní 1, tel.: +420 542 210 909
**Gourmand** | francaj manĝaĵoj | Josefská 14, tel.: +420 542 211 030
**Zorbas** | grekaj manĝaĵoj | Sokolská 6, tel.: +420 549 213 687

## Aĉetejoj, superbazaroj

**Galerie Vaňkovka** | 130 vendejoj, restoracioj, kafejoj | en Vaňkovka, inter la trajna kaj aŭtobusa stacidomoj
**Velký Špalíček** | vendejoj, multekinejo | Mečová 2
**Dům pánů z Lipé** | **Rozkvět** | **Omega** | náměstí Svobody
**Komerca galerio Orlí** | Orlí 3
**Avion Shopping park** | Skandinávská 2 (direkte al Bratislavo, magazena zono Brunno-Sudo)
**Olympia** | magazena kaj amuza centro | Modřice (superbazara zono Brunno-Sudo)
**OC Futurum** | Vídeňská 100 a **OC Královo pole** Cimburkova 4

# Informoj |

## Turisma informa centro (TIC) de Brunno

- Informa centro (IC) Radnická 8 (la ĉefa informa centro en Malnova urbodomo)
- Informa centro (IC) Nádražní 8 (vidalvide al la ĉefa trajna stacidomo)
- Informa centro (IC) Foira ekspoziciejo, pavilono E (funkcias dum la foiroj)

tel.: +420 542 211 090, +420 542 423 960, e-mail: info@ticbrno.cz, www.ticbrno.cz

**Servotempo (la ĉefa informa centro):**
oktobro - marto: lunde - vendrede 9.00-18.00, sabate 9.00-17.00, dimanĉe 9.00-15.00
aprilo - septembro: lunde - vendrede 8.30-18.00, sabate, dimanĉe, festotage 9.00-17.00

**Servoj al turistoj:**

- informoj pri la urbo, ĝiaj monumentoj, kulturaj kaj sportaj aranĝoj
- informaj prospektoj kaj broŝuroj pri la urbo
- rezervado de loĝigo, informado pri restoracioj
- ĉiĉeronaj servoj
- vendado de gvidlibroj, mapoj, libroj, kompaktdiskoj, bildkartoj kaj memoraĵoj
- somersezone stampado de kopioj de historiaj moneroj

## Trafiko

Dopravní podnik města Brna a. s. | urba trafika entrepreno
Hlinky 151, tel.: +420 543 171 111, informoj: +420 543 174 317, www.dpmb.cz

Integrita Trafika Sistemo de Sudmoravia regiono (IDS JMK), tel.: +420 543 174 317, www.idsjmk.cz

Letiště Brno a.s. | aerodromo
Letiště Brno | aerodromo | Brno-Tuřany: +420 545 521 309-10, www.airport-brno.cz

Aŭtobusa kaj fervoja trafiko | www.jizdnirady.cz



Turisma trajneto | majo - septembro el la strato Benešova
(fronte al la hotelo Grand) al la burgo Špilberg, www.vlacekbrno.cz

## Interreto

Avion | Česká 150, tel.: +420 542 211 757
Netcom plus | Pionýrská 13, tel.: +420 608 803 676
Netkafe.cz | Jezuitská 3, tel.: +420 542 210 174
Biblioteko Jiří Mahen | Kobližná 4, tel.: +420 542 532 111, www.kjm.cz




© SHOCart, spol. s r.o., Zlín



Foira ekspoziciejo